

Tiel ni markas la 75an naskiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo, parto 5a
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 756, 1978.04.05 & 07 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Dum prelegaro ni prezentos al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpos el la revuo Svisa Espero. Tiel ni markas la 75-an nakiĝjaron de Svisa Esperanto-Societo.

A.- La svisaj esperantistoj komencis la jaron 1906 meditante leteron, kiun d-ro Zamenhof skribis al sinjoro Schneeberger, la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Jen ni legas kelkajn erojn el tiu letero:

Cl.- «Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj esperantistoj decidis inviti la 2-an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale homa.»

A.- En tiu letero Zamenhof antaŭvidis ion, kio, almenaŭ ĝis nun, ne realiĝis. Aŭdu:

Cl.- «Mi antaŭvidas, ke venos la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta esperantistaro.»

A.- En tiu letero Zamenhof alportis praktikajn konsilojn, kiuj influis la kongres-organizantojn:

Cl.- «Mi esperas, ke la svisaj esperantistoj faros ĉion, kion ili povas, por bonege prepari la kongreson kaj fari el ĝi imponantan grandiozan manifestacion de interpopola frateco. En ĉiuj kunvenoj kaj solenoj krom la esperantistoj povu partopreni ankaŭ kiel eble plej multe da ne-esperantistoj - kompreneble ne kiel membroj de nia familio, sed nur kiel gastoj. Por tio oni devus kiel eble plej frutempe veki la intereson de la tuta mondo por nia kongreso per lerte kaj alloge verkitaj gazetaj artikoloj, pri kiuj kredeble zorgos la «Provizora Komitato de Organizado.» - fino de la citaĵo.

A.- En februaro 1906 Svisa Espero donas informojn pri tiu provizora komitato, kiu tre ageme laboradas kaj havas kunvenojn ĉiam pli oftajn. Kaj letero ricevita de la Internacia Organiza Komitato, elektita en Boulogne-sur-Mer, informas, ke Ĝenevo estis elektita kiel kongresurbo. Jen eroj el tiu letero:

Cl.- «Laŭ la komizio donita de la kongreso de Boulogne-sur-Mer, kaj post enketo al diverslandaj grupoj esperantistaj, la Internacia Organiza Komitato decidis unuvoĉe akcepti la inviton de la Svisa Esperantista Societo, por kunvenigi la venontan kongreson en Svisujo. Konsente kun tiu societo, kaj kun la grupo esperantista en Ĝenevo, ĝi komisiis al tiu lasta grupo la taskon fondi lokan komitaton, por helpi la organizadon de la kongreso, en tiu lasta urbo. Tiu loka komitato devos sin okupi pri la starigo de la parto de la programo, kiu koncernas la festojn, ekskursojn kaj akceptojn, rezervante sufiĉan nombron da kunsidoj por la laboroj de la kongreso. La Internacia Organiza Komitato, konsente kun la Lingva Komitato, prilaboros la programon de tiuj kunsidoj.» - fino de la citaĵo.

A.- Ni legis erojn el tiuj du leteroj por komprenigi al vi, ke en 1906 la organizado de Universala Kongreso de Esperanto estis granda aventuro. Ĉio estis nova. Estis necese difini ĉies respondecojn.

Cl.- La revuo Svisa Espero alportas detalegajn informojn pri la preparlaboroj. La 7-an de marto okazis en Ĝenevo prepara publika kunveno, dum kiu sinjoro Schneeberger, la prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, prezentis la 15 membrojn de la Loka Organiza Komitato, kies sekretarioj estis Edmond Privat kaj Hector Hodler, gimnazianoj 16- kaj 18-jaraĝaj.

A.- Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, kiu okazis en Olten la 16-an de aprilo kun 32 ĉeestantoj, post aŭdo de raporto prezentita de Edmond Privat, decidis lasi la tutan organizadon de la 2-a Universala Kongreso al la loka kaj internacia organiza komitatoj. Tiu kunveno havis eksterordinare riĉan programon. En ĝi estis prezentitaj raportoj koncerne propagandon ĉe la landestraro, ĉe la gazetaro, ĉe la universitatoj, ĉe la komercistoj, ĉe la oficistoj svisaj kaj kantonaj, ĉe la laboristaj organizaĵoj. Krome oni diskutis pri la eldono de varbiloj, pri la ekzakta rolo de Svisa Espero, pri la financaj demandoj, kiuj ne estis tre kontentigaj kaj pri la eldono de la teatraĵo Wilhelm Tell de Schiller, kiun tradukis sinjoro Meier el München. Tiu riĉa tagordo bone respegulas la dinamismon de la tiama esperantomovado en Svislando kaj la bonan gvidkapablon de la eksterordinara prezidanto Schneeberger. En la historio de Svisa Esperanto-Societo tiu kunveno de la 16-a de aprilo 1906 restas eksterordinara ĉiurilate.

Cl.- En aŭgusto, en bonveniga artikolo al la kongresanoj, Svisa Espero priskribas la laboron de la Loka Organiza Komitato. Ni citas kelkajn frazojn:

A.- «Ĉiumarde, vespere, en la malgranda ĉambro de l’Kongresa Oficejo, lumigata de tre modesta lampo, sub la lerta, serioza kaj tamen ofte ŝercema prezido de S-ro Edouard Bernard, la ĝenevaj samideanoj priparolis, pridiskutis amike la gravan aferon. Mardon post mardo, malrapide sed prudente kristaliĝis nia programo. Malmulte da komitatanoj havis sperton pri organizado de kongreso, ili preskaŭ ĉiuj estas junuloj aŭ junaj homoj.» - fino de la citaĵo.

Cl.- Apud tiu preparlaboro la ĝenevaj esperantistoj ankoraŭ trovis la tempon organizi propagandajn kunvenojn kun teatraĵetoj kaj ĥoroj. La motoro de tiuj manifestacioj, kiujn ĉiam konkludis malfermo de nova kurso, estis la juna dinamisma Edmond Privat.

A.- Krom tio Edmond Privat ankoraŭ akceptis partopreni preleg-vojaĝon kun sinjorino Junk aŭ sinjoro Schneeberger, kiuj propagandis esperanton en Aarau, Les Brenets, Le Locle, La Chaux-de-Fonds, Biel, Bern, La Neuveville, Zürich, Rolle, Nyon, kaj tiel plu. En ĉiuj tiuj urboj, kiel diras la raporto, Esperanto festis veran triumfon kaj ni vidas ekesti grupojn. Oni sin demandas, kiam, la gimnaziano Edmond Privat trovis la tempon studi. Li devis havi tre komprenemajn gepatrojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!